# Pelikan

# Inko




GÜNTHER WAGNER · HANNOVER

# Pelikan

## INKOJ POR SKRIBI KAJ POR KOPII

4001 Plej bona inko por librotenado kaj skribado. Inko ferogajla. Tre agrable fluanta en blueta nuanco. Skribaĵoj nigriĝas kaj ne paliĝas.

3001 Forta inko por kopii. Vera inko lignokampeĉa. Fluas viol-nigre, restas longtempe kopianta. Donas en la kopipremilo 3-6 kopiojn. Ne por librotenado.




Originalaj Pelikan-boteloj.

5001 Inko por skribi kaj por kopii. Inko ferogajla, fluas bluete, nigriĝas. En la kopipremilo ĝi donas 2–3 kopiojn. Uzebla ankaŭ por librotenado.

6001 Forta inko kopianta, violkolora. Fluas violkolore kaj konservas ĉi tiun nuancon. Donas 3-6 kopiojn. Ne disfluas en la kopiaĵo.

UJOJ:

La unuaj 3 specoj estas liverataj en originalaj Pelikan-boteloj enhavantaj 1/16 ĝis 2 litr.; plue en rondaj kaj angulaj inkujoj por la skribotablo. Speco 6001 nur en boteloj enh. 1 aŭ 1/2 litr. kaj en skribotablaj inkujoj.

# Pelikan

## KOLORA INKO

Agrable facilfluanta kaj brilanta. Malcedema al la Luminfluo.

Koloroj: ruĝa, blua, verda, viol-blua, flava kaj bruna.




Nº 12 G

Originala Pelikan-botelo.

Nº 1/32 G

UJOJ: Originalaj Pelikan-boteloj enhavantaj 1/16 ĝis 1 litr., plue malgrandaj kaj pli grandaj rondaj aŭ angulaj inkujoj por la skribotablo.

# Pelikan

## INKO POR FONTOPLUMINGO

Inko ferogajla treege facilfluanta kaj adaptita al la subtila meĥanismo de l' fonto-plumingo. Ne difektas la orplumon. Fluas bluete, nigriĝas, estas liverata ankaŭ kopianta kaj en la nuancoj viol-blua kaj blua.




No. 636 Vojaĝa ingo

Originala Pelikan-botelo

No. 1/32 G

UJOJ:

Originalaj Pelikan-boteloj, enhavantaj 1/16 ĝis 1 litr.; rondaj kaj angulaj inkujoj por la skribotablo; praktikaj diversformaj ingoj por la vojaĝo (lignaj, aluminiaj aŭ kartonaj).

Haveblaj en la komercejoj

# Pelikan
## FARBKUSENOJ

Pelikan-farbkusenoj donas klarajn kaj fortkolorajn depresaĵojn. Ili estas eksterordinare longdaŭre uzeblaj kaj pro tio tre ekonomiaj dum la uzado.

Koloroj:
viol-blua, nigra, ruĝa, blua kaj verda.




FORMATOJ:
No. 0 ....... 180×150 mm
No. 1 ....... 162× 90 mm
No. 2 ....... 115× 70 mm
No. 3 ....... 93× 52 mm
No. 4 ....... 60× 40 mm

No. 1 b. Stampila kesteto 162×91×40 mm, enhavanta 1 farbkusenon 87×65 mm.

No. 2 S. Farbkuseno kun aŭtomate malfermiĝanta kovrilo. Formato 115×70 mm.

# Pelikan
## GUMO FLUIDA

Pelikan-gumo estas fabrikata el vera gumo araba; havas egan gluforton kaj estas agrable kaj facile disetendebla. Gumo Pelikan taŭgas por ĉiaj paperoj, eĉ la plej delikataj.




Piramidforma botelo — Pelikan-botelo — Sonorilforma botelo

UJOJ:
Pelikan-boteloj enhavantaj 1/8 ĝis 1 kg, aŭ 1 kaj 1/2 litr. Piramidformaj boteloj kun enhavo de 18-240 g. Sonorilformaj boteloj en diversaj grandoj. Praktikaj glasoj kun guma kloŝo aŭ nikela kapsulo kun spongo.

# PELIKANOL
## LA PERFEKTA GLUILO

Blanka pastsimila gluilo. Konserviĝas longtempe, eĉ se ne uzata ofte. Pro ĝia bonega gluforto kaj neteco dum la uzado oni preferas ĝin pli kaj pli por ĉiaj bonaj glulaboraĵoj. Pelikanol estas la plej taŭga gluilo por kontoroj, fotografaj metiejoj kaj la hejmo.




Larĝkola Glaso


Tubo

UJOJ:
Larĝkolaj glasoj kun ŝraŭbkovrilo enhavantaj 50 g ĝis 1 kg. Tuboj enhavantaj 15 ĝis 110 g. Praktikaj kontorvazoj kun akvujeto kaj peniko: glasoj enh. 150 g kaj 300 g, aluminia skatolo enh. 190 g. Por granda bezono: ladaj skatoloj aŭ siteloj enh. 1, 2 1/2, 4 1/2 kaj 9 kg.

Atentu pri la marko kaj nomo Pelikan

# Pelikan
## SKRIBRUBANDO

La skribrubando Pelikan estas fabrikata el teksaĵo pli daŭra ol la plej bona skribrubanda teksaĵo alie konata. Koncerne la farbhavon, fakuloj ĝin difinis la plej longtempe farbdona rubando. Pro tio la Pelikanrubando estas pli malmultekosta ol aliaj rubandoj je pli malaltaj prezoj.




Pelikan-rubandoj estas fabrikataj por ĉiuj koloroj kaj kopiantaj, nekopiantaj, hektografaj, aŭtografaj (litografaj), por ĉiu skribmaŝinsistemo, plue por literaj presiloj, kontrolhorloĝoj, kalkulmaŝinoj. Specialaj deziroj koncernantaj la gradon de la farbhavo povas esti plenumataj. Senkostaj provaĵoj laŭ deziro.

# Pelikan
## KARBOPAPERO POR SKRIBMAŜINOJ KAJ MANSKRIBILOJ

Karbopapero Pelikan por skribmaŝinoj donas intense koloritajn netajn kopiojn. Ĝi estas tre farbhava kaj pro tio tre ekonomia dum la uzado.

Havebla en ĉiuj koloroj, por ĉiaj celoj, en diversaj kvalitoj: plej delikataj kaj malpli delikataj paperoj.

Por librotenaj maŝinoj k.a. specialetaŭgaj specoj, ankaŭ en ruloj.

Senkostaj provaĵoj laŭ deziro.




Pelikan-karbopapero por manskribiloj estas fabrikata laŭ la samaj principoj kiel Pelikan-karbopapero por skribmaŝinoj. Ĝi posedas la samajn bonkvalitajn ecojn: ĝi estas tre farbhava, intense koloranta kaj neta dum la uzado. Liverebla en ĉiuj specoj, koloroj kaj formatoj; plej delikataj kaj malpli delikataj paperoj. Por traskribado per plumo, krajono aŭ agato. Senkostaj provaĵoj laŭ deziro.

# Pelikan
## MULTOBLIGAJ ARTIKLOJ

Pelikanotyp, la daŭra stencilpapero, ebligas preskaŭ senliman nombron da klaraj kaj netaj kopioj.

Kontraŭe al ordinara vakspapero la Pelikanotyp estas malcedema al temperaturinfluoj, ĝi ne difektiĝas per ĉifiĝo kaj estas entute tre rezistema. Ĝi estas tuj preta al uzo sen ia preparo kaj same taŭga por la multobligado per oleo- aŭ akvofarbo. Havebla por ĉiuj multobligaj aparatoj, por rotaciaj aŭ plataj aparatoj, por maŝin-kaj manskribado.




Se oni volas certigi sin atingi bonajn multobligajn rezultatojn, oni uzu kiel akcesoraĵon al Pelikanotyp la multobligajn farbojn Pelikan. Ambaŭ fabrikaĵoj estas adaptitaj unu je la alia kaj suplementas sin reciproke.

OTIN, oleofarbo, en tuboj de 200 g kaj 500 g kaj en rondaj ladaj ujoj de 1 kg.

AQUIN, akvofarbo, en rondaj ladaj ujoj de 250 g, 600 g kaj 1 kg.

No. 602 esper.